# Bulteno

## de Esperantista Klubo en Prago

Časopis Klubu esperantistů v Praze N-ro 1/2025 (233) 30. 6. 2025

# Ĝenerala kunveno 2025




La 27-an de marto 2025 okazis ĝenerala kunveno de la Esperantista klubo en Prago en la kunvenejo en la strato Revoluční. La partopreno estis abunda. Estis elektita nova komitato, sed kun la sama membraro, nome: Tomáš Břicháček (prezidanto), Jiří Mišurec (vicprezidanto kaj kasisto), Vlasta Pištíková kaj Petr Javorik. Sekvis diskuto pri estonta agado de la klubo.

*(Legu pli sur la paĝoj 3–5.)*

**EL LA ENHAVO**

Ĝenerala kunveno …………………………........ 3
E-mental’ en Berlino .................................... 6
Fontoj de bitlibroj en Esperanto ….............. 8
80 jaroj ekde la fino de la 2-a mondmilito ... 10
Rudolfena Prago .......................................... 13
Jubileo de Josef Václav Sládek …………... 21
Ĉu estas land’ ............................................. 23

**O časopisu**

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brichacek@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petrík

# AKTUALAĴOJ

## Okazintaĵoj ekde januaro

**16/01/2025** – diskuto pri la propagado de Esperanto gvidita de Josef Kalčík *(kunvenejo)*

**22/02/2025** – tradicia E-mentala aranĝo Bestĝardeno

**13/03/2025** – prelego de Pavla Dvořáková pri utilaj senpagaj interretaj helpiloj por verkado kaj tradukado; poste muzika programo

**14–16/03/2025** – E-mentala ekskurso al Berlino

**27/03/2025** – ĝenerala kunveno; elektita nova estraro: Tomáš Břicháček (prezidanto), Jiří Mišurec (vicprezidanto kaj kasisto), Vlasta Pištíková kaj Petr Javorik *(kunvenejo)*

**28– 30/03/2025** – E-mentala aranĝo 20-a BIERo en Kroměříž

**22/05/2025** – prelego de Tomáš Břicháček pri la genealogio *(kunvenejo)*

**19/06/2025** – antaŭferia festo; prezentado de Vlasta Pištíková pri ŝiaj hobioj *(kunvenejo)*

**Esperanto očima našich seniorů**

**Porozumění mezi lidmi různých národů? Že vám není lhostejné? Že pro vás není jen fráze, jen prázdný pojem?**
A jak by se vám líbilo, kdybyste, ač neznalí místního jazyka, cestovali do nějaké země, kterou již dávno toužíte poznat, a máte naději, ne-li jistotu, že se domluvíte?
A kdyby se tento jazyk používal na mezinárodních akcích a vedlo to ke zvýšení šance na vzájemné porozumění.
A kdyby teoreticky (někdy v budoucnu) mladému člověku nepříliš nadanému na studium cizích jazyků stačilo pro život znát kromě své mateřské řeči ještě esperanto a měl by tím „vyhráno“!



Běla Sýkorová

# Zápis ze zasedání členské schůze 27. března 2025

Leonarda Chaloupková, Vlasta Stará

Dne 27. března 2025 od 17 hod. se konalo v klubovně v ulici Revoluční 5, Praha 1, zasedání členské schůze Klubu esperantistů v Praze, pobočného spolku Českého esperantského svazu, z. s.

**Účast**

Dle stanov Českého esperantského svazu, z.s. platí, že členská schůze klubu (včetně klubu, který je pobočným spolkem) je schopna usnášet se při účasti alespoň 5 členů s hlasovacím právem. Tato podmínka byla splněna. Účastnilo se 13 členů s hlasovacím právem.

**Volba zapisovatele a ověřovatele**

Členská schůze jednomyslně (13 hlasy) zvolila jako zapisovatelku Leonardu Chaloupkovou a jako ověřovatelku Vlastu Starou.

**Zpráva předsedy**

Předseda klubu Tomáš Břicháček přednesl zprávu o fungování klubu v období od posledních voleb výboru (31. 3. 2022). Členská schůze vzala zprávu na vědomí.

**Zpráva místopředsedy a pokladníka**

Místopředseda a pokladník klubu Jiří Mišurec přednesl zprávu o členské základně a stavu financí. Členská schůze vzala zprávu na vědomí.

**Volba předsedy a dalších členů výboru**

Poté proběhla volba předsedy a ostatních členů výboru.
Členská schůze zvolila za předsedu Tomáše Břicháčka (12 hlasů pro, 0 hlasů proti, 1 se zdržel).
Za ostatní členy výboru byli zvoleni Jiří Mišurec, Vlasta Pištíková a Petr Javorik (10 hlasů pro, 0 hlasů proti, 3 se zdrželi).

**Volná diskuse**

1) Josef Kalčík – poděkování předchozímu výboru; článek v BULTENO o svobodě slova; jako člen výboru ČES – připravovat atraktivní obsah schůzek; informovat o činnosti výboru ČES; potřeba vytvořit inform. letáček pro čes. publikum
2) Vlasta Pištíková navrhuje svoje téma na příští schůzku E-klubu.

3) Petr Chrdle – pozvánka do Svitav na 30. a 31. 5. // 30. 5. muzejní noc, 31. 5. vernisáž E-výstavy, E-muzea ve světě; křest knihy P. Chrdleho o BERTĚ SUTTNER
4) Jiří Tomeček – poděkování předchozímu výboru; pozvánka na 13. 4. – marcipánové Velikonoce v E muzeu Svitavy




Staronový výbor

---

## Parolo de la prezidanto
Tomáš Břicháček

Estimataj samideaninoj kaj samideanoj! Karaj geamikoj!
Mi volus elkore bonvenigi vin en la ĝenerala kunveno de nia klubo. Ĝi okazas preskaŭ precize tri jarojn post la pasinta. La 31-an de marto 2022 la klubo elektis tiun ĉi komitaton, en kiu laboris Jiří Mišurec kiel vicprezidanto kaj kasisto, Vlasta Pištíková – organizantino de sociaj aranĝoj –, Petr Javorík – nia informadikisto kaj teknikisto – kaj mi Tomáš Břicháček kiel prezidanto.
Jiří Mišurec, Vlasta kaj mi servas jam 11 jarojn en niaj funkcioj. Kaj Petr Javorík la lastajn tri jarojn.

La ĝenerala kunveno estas ĉiam ŝanco retrorigardi kaj analizi niajn aktivecojn kaj elstarajn eventojn de la lasta periodo. Entute oni povas diri, ke ĉi tiu periodo estis tre sukcesa por la klubo. Post la koronvirusa pandemio ni reviviĝis, ni organizis grandegan nombron da eventoj kaj nia membraro kreskis.
Laŭ miaj notoj okazis 34 prelegoj kaj prezentoj, 7 seminarioj kaj diskutoj kaj pli ol dek sociaj amuzaj aranĝoj. Oni publikigis 9 numerojn de la Bulteno. En nia jutuba kanalo aperis granda nombro da videoj – prelegoj, rakontoj, poemoj, kantoj kaj ankaŭ kurso por komencantoj.
Kiam ni rigardas malantaŭen, ŝajnas, ke ĉiu el la tri pasintaj jaroj havis sian grandan temon:
En la jaro 2022 tio estis la 120-a datreveno de la fondiĝo de nia klubo. Ni preparis nin longe por ĝi. Kaj en novembro de tiu jaro ni organizis grandan feston – kun prelegoj, promenoj, filmoj, kantado ktp. Partoprenis ĝin kvar dekoj da samideanoj de kvin landoj.
La jaro 2023 alportis freŝan venton kun la alveno de Jiří Altior, viziulo kaj multlertulo. Komencis nia fruktodona kunlaboro kun lia Instituto de renesanco de kultura heredaĵo. El ĉi tiu kunlaboro ekestis vico da kulturaj eventoj kaj aliaj entreprenoj. Inter alie ni ankaŭ tradukis kelkajn kantojn.
En la jaro 2024 nia klubo devis translokiĝi al alia adreso – el la strato Ve Smečkách al ĉi tiu loko – kiu parenteze estas proksime de la vendejo de nia fama granda prezidanto Jaroslav Šustr. La translokiĝo estis komplika, sed ni sukcesis. Ni akiris pli komfortan lokon ĉi tie por niaj kunvenoj. Estas eble pli da bruo, sed multe pli da spaco.
Kaj ĉijare nia granda temo estas la universala kongreso en Brno. Multaj en ni ĉeestas ĉe la organizado.
Lastatempe en la klubo aliĝas multaj novaj membroj. Kun ili venas nova forto, nova energio kaj nova entuziasmo.
Fine mi volus esprimi dankon al miaj gekolegoj el la komitato: Jiří, Vlasta kaj Petr, kiu diligente laboris por la klubo dum ĉiuj tiuj jaroj. Mi ankaŭ dankas al ĉiuj klubanoj kaj favorantoj, kiuj aktive kontribuis al nia funkciado kun siaj programeroj aŭ tekstoj al nia Bulteno – la plej aktivaj estis sinjorino Margit Turková, Petr Chrdle kaj Pavla Dvořáková. Oni povas diri, ke ĉiu prelego, seminario, amuza socia aranĝo aŭ artikolo por la Bulteno estas valora kontribuaĵo por la funkciado de la klubo kaj por la Esperanta vivo en Prago.
Mi dankas pro via atento kaj antaŭĝojas nian venontan kunlaboron en la venontaj jaroj.

# E-mental' en Berlino

Vlasta Pištíková

Dum la semajnfino 14. – 16. 3. 2025 membroj de la klubo E-mental' vizitis germanan ĉefurbon Berlin.
Ilia plano estis ekkoni urbon kaj precipe renkontiĝi kun lokaj esperantistoj. Kvankam la planado de la ekskurso estis iom malfacila, fine la semajnfino estis por ĉiuj partoprenantoj tre bela, interesa kaj ĝojiga.
Al Berlino la grupo venis per rekta buso el Prago. Jam en la busstacidomo atendis ilin unu esperantistino, kiu akompanis ĉiujn al la hostelo, kie E-mentalanoj havis menditan loĝigon. La hostelo estis bone atingebla per urba trafiko kaj oni sufiĉe rapide povis veni tien.
Post rapida enloĝigado ĉiuj kune iris al nemalproksima restoracio por vespermanĝi kune kun pluaj esperantistoj. La restoracio estis en la stilo de Orienta Germanio kaj ĉiuj dekoraciaĵoj estis en la stilo de tiu tempo.
Same la manĝajoj kaj bedaŭrinde ankaŭ la tempo, dum kiu oni devis atendi, ĝis ĉiuj estos priservitaj. Sed babilante kun la lokuloj ne estis la atendado tiom neeltenebla, do kiam ĉiuj finfine ricevis sufiĉe bongustan manĝaĵon, ĉiuj kontentis.
Sabate post matenmanĝo, kiun E-mentalanoj preparis en hostela kuirejeto, ĉiuj ekis al la centro de la urbo por kunveni kun lokuloj, kiuj promesis duhoran ĉiĉeronadon tra interesaj lokoj. Kvankam estis pluvema kaj ne tro varma vetero, ĉiuj ĝuis kaj la promenon kaj rakontadon.
Tagmeze, kiam la vetero pliboniĝis kaj eĉ aperis suno, estis kunveno kun pluaj esperantistoj en Esperanto-klubejo kaj de tie oni iris al proksima monteto, kie oni faris komunan foton, tostis je german-ĉeĥa amikeco kaj precipe oni tie anstataŭ tagmanĝo piknikis.



Post plua promenado ĉiuj ĝojis, kiam oni povis sidiĝi en kafejo en la centro de la urbo kaj iom ripozi. Poste oni vizitis restaĵojn de la berlina muro kaj ĉiuj jam ĝojatendis vespermanĝon en barata restoracio.
Post la vespermanĝo nur kelkaj E-mentalanoj estis sufiĉe fortaj por reveni al la hostelo perpiede, kiu estis sufiĉe for de la restoracio. Aliaj uzis prefere urban trafikon.
Post dimanĉa samstila matenmanĝo ĉiuj E-mentalanoj estis gvidataj de la hostelo al East Side Gallery por vidi pluajn restaĵojn de la berlina muro, kiuj en tiu ĉi loko estas pentritaj de diversaj artistoj.
De la muro parto de la grupo ekis perpiede al la centro de Berlino kaj parto uzis urban trafikon por atingi Alexanderplatz. Tie la pigruloj atendis pli diligentajn E-mentalanojn en kafejo kaj poste ĉiuj kune plu promenis tra la centro.
Tagmanĝon meritis ĉiuj kaj do oni kune manĝis en antaŭmendita meksikia restoracio.
Poste jam forveturo al ĉefstacidomo, kie E-mentalanoj adiaŭiĝis kun la lokuloj, kiuj akompanis ilin. Trajno venis ĝustatempe kaj E-mentalanoj envagoniĝis. Dum la vojaĝo reen al Prago ĉiuj parolis pri la travivita semajnfino, pri la vidinda urbo kaj precipe pri belaj momentoj kun novaj amikoj. Ili ĉiuj nun estas atendataj en Prago por kune travivi pluajn komunajn momentojn!



# Fontoj de bitlibroj en Esperanto (1)

Pavla Dvořáková

Esperanta beletro, nepre grava por nia movado kaj komunumo, povas plu evolui kaj resti vivanta ne nur dank al aŭtoroj, tradukistoj kaj eldonistoj, sed nelastvice al legantoj. La 21-a jarcento alportis esencajn transformojn en la formo, enhavo kaj manieroj de legado, movante la literaturon pli al cifereca kaj interaga direkto. Kiel ni orientiĝu en la interreta libromerkato kaj kiel ni uzu ĝin? Jen kelkaj el la utilaj ligiloj, kiujn mi prezentis en aprilo en la klubo.
En la retpaĝo http://archiv-muzeum.esperanto.cz/cs/knihovna de la **Esperanto-muzeo en Svitavy** troveblas i.a. listo de gravaj elektronikaj bibliotekoj kaj superrigardoj pri gravaj Esperanto-verkistoj kaj iliaj verkoj. Detalan informfonton pri originala Esperanto-literaturo ofertas la portalo **Originala Literaturo Esperanta** http://literaturo.esperanto.net prizorgata de la verkisto Sten Johansson kaj entenanta i.a. recenzojn pri unuopaj verkoj. **Baza legolisto en Vikipedio** https://eo.wikipedia.org/wiki/Baza_legolisto entenas titolojn de (laŭ W. Auld) la plej elstaraj kaj plej legindaj verkoj de Esperanta beletro.

Kie eblas trovi kaj laŭeble senpage elŝuti bitlibrojn?
En **Esperanto.cz** https://www.esperanto.cz (en la rubriko O esperantu/Kultura/Literatura) disponeblas specimenoj de kvalitaj aŭtore liberaj librotradukoj el la ĉeĥa (rekomendindas ekz. *Ĉeĥoslovaka antologio*, *Rakontoj* de Arbes, *Tridek jarojn en la Ora Nordo* de Welzl aŭ psikologia sciencfikcia novelo *Mi en li* de Vladyka).
La plej malnova tiuspeca retejo **Biblioteko de Don Harlow** http://literaturo.org/HARLOW-Don/Esperanto/Literaturo/literaturo.html entenas nelongajn tekstojn originalajn kaj tradukitajn, facile printeblajn, diferencigitajn je ĝenroj per koloro. En la paĝo https://esperantobrno.cz/malnova/bitlibroj.html **de la Brna klubo** eblas senpage elŝuti pli ol 200 diversĝenrajn librojn en PDF de la eldonejo INKO de Franko Luin, parte ankaŭ el aliaj fontoj. Miaflanke plej rekomendinda estas la nova portalo **Libro.ee** https://libro.ee, disponiganta multcentojn da bitlibroj, filtreblaj laŭ temo aŭ speco de dokumento.

Se vi pretas pagi akcepteblan prezon por altkvalita libro, menciindas nepre **Bitlibroj.com** https://www.bitlibroj.com de la novjorka eldonejo Mondial. Proprasperte facilas pagi per karto kaj sekve tuj ricevi la libron retpoŝte. Multaj eldonaĵoj parte trarigardeblas en Books.google.com, faciligante tiel la aĉetdecidon.

Se vi havas konton ĉe Facebook kaj volas trovi tie samhobiajn geamikojn, vi povas aliĝi al la grupoj  Literatura Babilejo, Mikronovelo, Esperanto-literaturo kaj muziko aŭ PDF-/-EPUB-Librejo (al kiu la membroj aldonas elŝuteblajn librojn). Uzantoj de Telegramo povas aliĝi al la kanalo Librejo: libroj en Esperanto.
Nova fenomeno estas sonlibroj kaj videolibroj, troveblaj en Jutubo: ekz. kanaloj Tuurql (libroj de K. Čapek kaj E. Petiška), Bobelarto (kvalitaj sonregistraĵoj de noveloj gajnintaj en la literaturaj konkursoj) k.a.

Pliajn informojn, ekzemplojn kaj rekomendojn mi alportos sekvanumere.
Mi deziras al vi sukcesan trovadon de por vi interesaj libroj kaj ĝudonan legadon. Mi scivolas pri partumo de viaj librotravivaĵoj!



## Unuaj paŝoj post la liberigo

Stanislav Kamarýt

La ministerio por internaj aferoj konfirmis per la dekreto el la 25-a de aŭgusto 1945, n-ro IV-3111-21/8-45-7, ke la Asocio rajtas repreni sian laboron kaj siajn rajtojn surbaze de la jura kontinuigo de la ekzisto. Kvankam ni rajtis en 1945 rericevi la iaman oficejon en la strato Truhlářská, oni ne redonis ĝin al ni. Ĝi estis komprenebla, sed hontinda.
Jam de la 17-a de septembro 1945 funkciis regulaj Esperanto-disaŭdigoj, kiujn enkondukis Radio Praha sur la mezlongaj ondoj laŭ iniciato de Adolf Malík. La ĉiutagaj mallongondaj elsendoj estis inaŭguritaj per prelegoj de Malík kaj Kamarýt la 24-an de septembro 1945.
La unua postmilita regula kongreso de la Asocio okazis en Prago la 20-an de januaro 1946. Ĉeestis 105 personoj el 23 lokoj. La kongreso decidis eldonadi Asocian organon kun nova titolo Esperantista kaj liveradi ĝin al ĉiuj membroj por la jara kotizo 70 Kčs. La gazeton redaktis Kamarýt.
Serĉi novon ejon por la oficejo de la Asocio estis tasko malfacila. Fine ni sukcesis trovi butikon kaj unu ĉambron luitan de samideano Tomáš Balda en la centro de la ĉefurbo (Praha II, strato Malá Štěpánská n-ro 7), kie nia oficejo eklaboris nur en majo 1948. Tie eklaboris Tomáš Balda kiel nia profesia oficisto. Baldaŭ aperis bezono de plua laboranto. La edzino de Tomáš Balda, Marie, akceptis la postenon. Tio daŭris ĝis nia nova likvidiĝo.
En la jaroj 1946 kaj 1947 estis ĝeneralaj sekretarioj Emil Zavadil kaj post li Bohumil Paleček. Unu post la alia rezignis. Ili ne prezentis al si, ke funkcio en la komitato de la Asocio postulas tre altan valoron laboran kompense al la gloro el la funkcio eliranta. Ankaŭ tiu ĉi detalo ilustru la gradon de danko, kiun meritas la kunlaborantoj ĉiam.
De la jaro 1948 ĝis 1952 (likvido de la Asocio) ĝenerala sekretario estis Jaroslav Mařík.
Post la oficiala rekono pri la jura kontinueco de sia ekzisto ankaŭ dum 1939-1945 la Asocio rericevis sian librovendejan koncesion, gravan por la ekonomia vivo de la organizaĵo. Tamen ne estis rericevita la libroeldona koncesio.
Fine de la jaro 1945 EAĈSR havis 766 membrojn. En 1949 ĝi havis jam 3955 kaj la Slovaka Esperanto Societo (SES) 750 organizitajn membrojn, sume ĉirkaŭ 4700 en nia lando. La Klubo en Praha en 1949 havis 511 kotizantajn membrojn (rekordo).

Inter 1945 kaj 1952 ekzistis en nia lando 150 lokaj grupoj kaj rondetoj kun aŭ sen organiza interligiĝo kun EAĈSR, kvankam ne ĉiuj dum la tuta periodo.
En 1950 estis en 98 lokoj de la ĉeĥa landparto organizita agado de esperantistoj: 58 filioj de EAĈSR kaj memstaraj kluboj, 30 rondetoj kaj Esperanto-fakoj ĉe sindikataj kultur-kluboj plus 10 interes-rondetoj en lernejoj, en la slovaka landparto 12 lokaj grupoj kaj 2 gimnaziaj studrondoj - sume en 112 lokoj en unu jaro. Ĝi estis elokventa fakto pruvanta vivantecon de la movado en nia lando.
Ĉeĥoslovakio atingis la plej altan nombron de komitatanoj en UEA el ĉiuj ceteraj landoj: kvar. Ili estis J. Mařík, F. Pytloun, E. V. Tvarožek kaj J. Vondroušek.
Bone ekfunkciis la nove kreita sistemo de regionoj perantoj de la Asocio. En la propagando estis farita grava laboro, i. a. per publikaj paroladoj, gazetaro, flugfolioj kaj per praktika servo. La Asocio akiris bonan ekonomian bazon.
Kelkajn jarojn post 1945 la Asocia sidejo troviĝis ĉe la oferema kaj laborema samideano František Slavík en Praha XIX (Dejvice). En la strato Malá Štěpánská la Asocio ekposedis duĉambran oficejon kun tuttaga deĵoro de du salajrataj oficistoj (geedzoj Balda) kaj parte salajrataj librotenisto kaj redaktoro.
Ĝiaj du kongresoj post 1945, en Liberec (1949), patronita de la ministro V. Kopecký, kaj en Brno (1950), estis imponaj manifestacioj. Bone funkciis la Instituto de Esperanto-Servo [vidu 4.4.]. La ministerio por informado havis Esperantan subsekcion kun deĵoranto A. Malík, en 1949 la dua ĝia laboranto fariĝis M. Lukáš.
La Asocia gazeto Esperantista (1951, n-ro 3) resumis la situacion: „Milo da kongresanoj en Brno, sep mil afiŝoj pri tiu kongreso, 440 kursanoj en ĉiujaraj kvar someraj Esperanto-lernejoj, kelkcent partoprenantoj en 13 regionaj kunvenoj, pli ol dumil esperantistoj vojaĝintaj en jaro 1950 por eksterklubaj entreprenoj. Tio estas fakto elokvente pruvanta vivantecon de la movado.“ L. K. (Ludoviko Kökény) en Budapeŝta „Hungara vivo“ (1969, n-ro 1, p. 26) rezonas: „Mi – kiel historiisto de Esperanto – bone memoras, ke antaŭ dudek jaro Ĉeĥoslovakio estis la plej forta bazo de Esperanto en la tuta mondo.“ - (A. d. 1. red.)

*Fragmento de la libro Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio*

# El la kroniko de Jiří Patera

**1945/06/20** okazis la unua kluba kunveno post la milito kaj depost tiam ili okazis ĉiun merkredon en la tradicia klubejo de la kafejo Louvre, Národní tř. En la jaro 1945 estis 30 kunvenoj, kiujn vizitis sume 1126 membroj, 111 gastoj, 29 fremduloj.

Dum la milito en koncentrejoj pereis: Bunzl, Weisskopf, Waldstein, Robert Bloch kun edzino, Leopold Flajšr, Lederer kun edzino, f-ino Nasová, Peter Ginz k. s.

El koncentrejoj revenis: Otto Ginz, Rudolf Hromada, Frant. Buhr, Jos. Drlík, Hirsch (Hanak).

Ĉeĥoslovaka radio komencis elsendi E-lingvajn programojn.

**1945/09/17** komenciĝis mezondaj elsendoj (2-foje semajne, partoprenis pragaj esperantistoj, sed ankaŭ Forge kaj Szilagyi)

**1945/09/24** komenciĝis ĉiutagaj kurtondaj elsendoj (l5-minutaj, red. J. Mařík).

**1945/11/22** provleciono de E-kurso en Laborlernejo de ÚRO (sindikatoj), partoprenis 300 personoj, instruis Jean Forge, poste la kurson partoprenis 200 personoj, instruis Ant. Slanina kaj Václav Král

**1946/01/16** jarkunveno de la klubo, ĉeestis 73 personoj. La klubo havis je tiu dato 360 membrojn, el ili 180 el Prago kaj 180 ekster Prago. Prezidanto denove fariĝis Jar. Šustr, sekretario Fr. Sviták.

**1946/01/19** je la 20-a horo okazis amika kunesto de 85 kongresanoj en klubejo de kafejo Louvre kaj la 20-an de januaro 1946 je la 10-a horo komenciĝis la unua Ĉs. postmilita kongreso de AE ĈSR en la salono de kafejo Louvre kun ĉeesto de 105 personoj.

**1947** EKP kunvenas regule ĉiun merkredon je la 20-a horo en kafejo Louvre, Praha II, Národní 20. La programoj de la kunvenoj estas por ĉiu monato antaŭe fiksitaj kaj havas ĝenerale altan nivelon.

En oktobro oni fondis „Junularan rondeton“, en kiu kolektiĝas junaj klubanoj kaj disvolvas ĝojigan agadon. Estro de la „Junularo“ estas s-ano Josef Forman.

Kursoj de Esperanto okazas daŭre en Laborlernejo de ÚRO.

Konversacia kurso antaŭ ĉiu kunveno de la klubo, de la 19-a horo, instruas Ant. Slanina kaj Pavel Šlechta.

El la kunvenoj: 16.7. S-ino Anna Alamo: Prelego pri travivaĵoj kaj impresoj en ĈSR. 13. 8. S-ano I. Dratwer: Salutparolo en la nomo de polaj esperantistoj. 20. 8. D-ro Baur: Prelego pri Svislando, kun tri filmoj. En la granda salono de kafejo Louvre ĉeestis ĉ. 100 personoj, inter ili 9 eksterlandanoj.

**1947/11/22** je la 20-a horo en granda salonego de Virina Klubo Ve Smečkách 26 – Solena vespero kun arta programo honore al la 60 jaroj de Esperanto kaj 45 jaroj de la klubo

**1947/12/13** je la 20-a horo en granda salonego de Aeroklub, Ve Smečkách 22 – Gaja Nikolaa Vespero kun abunda programo, Nikolaaj donacoj kaj danco

# Rudolfena Prago

Margit Turková



En Eŭropo estas kelkaj lokoj, kiuj povas kun fiero memori jenajn famajn nomojn. Prago estas unu el ili. Kaj precipe la „Prago Rudolfena“… La nocio fariĝis historia kaj arta simbolo por la epoko, kiam amase disvolviĝis la arkitektura stilo, konata kiel „baroka“. Ĝi devenis el Italujo kaj en nian landon transprenis ĝin la majstroj, kiuj estis al ni bonvenig-alvenintaj. De tiam nia ĉefurbo estas fama kiel „urbo baroka“; kaj se ne la stilo famigis Pragon, do certe kaj sendube tion faris la Imperiestro RUDOLFO la Dua. Jes, li estis tiu ekstravaganculo, la Habsburgo, kiu por sia tronejo elektis ne tradician Vienon, sed la nefaman Pragon. Kaj de tiama tempo havas la urbo epiteton „Prago Rudolfena“ (Prague Rudolphinae). Li invitadis la plej famajn personulojn de Eŭropo; arkitektojn, belartistojn, skulptistojn kaj sciencistojn. Estas konate, ke pli ol sciencaj fakoj tio estis pseŭdo-sciencoj – inter ili la astrologio, kiu lin allogis, al kiu li kredis kaj estis ties konfesanto. Sed tio neniel malfamigas kaj Rudolfon kaj Pragon.

**Tycho Brahe**

Tycho Brahe (ne „de“) estis por Rudolfo la astronomo, kiun li volis havi ĉe sia korto. Ne pro lia renomo kiel astronomo – sed la astrologo. Tio klarigas multon pri la kontakto inter ili…

T. B. naskiĝis je la 14-a de decembro 1546 en suda parto de Svedujo – Skane (en Knudsrup), kiu tiam apartenis al Danujo, al danaj gepatroj. Same, kiel tiam ĉiuj astronomoj li serioze okupiĝis pri astrologio. Sed tamen astronomio lin altiris pli forte kaj lin faris fama tiomgrade, ke la dana reĝo Frederiko la Dua proponis al li (feŭde) la **insulon Hven**, ke li tie mem-mastrumadu. Brahe konstruigis tie observatorion, kiun li nomis **URANIBORG** (Uranio estas patronino de astronomoj). Kun siaj kunlaborantoj li tie noktojn, jarojn faris observadon de ĉielo kaj amasigis multegajn observaĵojn.

Kiam li perdis favoron de (la nova) reĝo (post eble 20 jaroj) li decidiĝis sian patrolandon forlasi kaj serĉi la okupon en alia(j) loko(j) de Eŭropo. (Li jam havis nombran familion, do…)
Prago estis la lasta. Kaj la escepta…
El niaj lernejjaroj ni rememoras T. B. „kiel la homon kun ora nazo“.
Tion oni povas vidi sur lia tomboŝtono en la preĝejo Týnský chrám. Jes, en sia junec-diboĉa tempo li perdis parton de la nazo en ia kverelo, kaj la tutan vivon li havis oran protezon, kio certe al li kaŭzis multajn komplikojn.
Krom tio li estas al popolo konata pro alia epizodo: je la 13-a de oktobro (1601) li partoprenis solenaĵon en la palaco de Rožmberk (Hradčany), kie ĉeestis ankaŭ la Imperiestro.
Ja, T. B. estis turmentita per la „korpa neceso“, sed li opiniis netaŭga forlasi la manĝotablon en la prezenco de la reĝo. Do, li „eltenis tion“, sed (eble) okazis akuta uremio kaj li mortis jam en la 24-a de la sama monato. En sia neplena 56-jariĝo. Li estis entombigita en Týnský chrám. La kortuŝan funebro-parolon havis d-ro Jan Jessenius. Kiam li estis rektoro de la universitato en Wittenberg, Tycho loĝis en lia domo, kun sia familio.

La ĉefaj meritoj de Tycho Brahe en astronomio estas jenaj:




**- li, kiel la unua – antaŭ de Galileo-teleskopo – uzis sian aparaton, (ankoraŭ ne kun optiko) t.n. „astronomia lorno“**
**- li faris sukcesajn klopodojn por organizado de science grava laboro.**
Jes, la informoj, la mezuroj amasiĝis en liaj manoj – sed ne la rezultoj, kiuj progresigus la fakon. Li tion ne kapablis (ne estis matematikisto) – eble eĉ pri tio ne strebis. „Nur“ li havis bonan instinkton: por la kunlaboro inviti la junan scienciston – JOHANNES KEPLER. Kaj kiam en Prago renkontiĝis jenaj „du planedoj“, okazis progreso.
**Estis konstruita la sistemo, la malkovro de la astronomiaj leĝoj, laŭ kiuj funkcias la kosmo (la universo).** Tiu konstruisto, tiu „arkitekto“ estis la matematikisto, kiu jam en sia 26-a jaraĝo havis altan renomon en la regionoj de la germana lingvo. La Imperiestro Rudolfo ne hezitis lin inviti (je instigo de T. B.!).

**Problemo(j) de astronomio**

La granda, grava demando ekzistis „de kiam ekzistas homaro“. Kiel funkcias la kosmo?

En la etapo, en kiu vivis niaj menciitaj astronomoj, por la mondo tiu problemo jam „ne staris“ de tiam, kiam la demandon („porĉiam“) respondis la greka astronomo PTOLEMAIO (85–166).

*La kosmo funkcias, ĉar ĝia koro estas nia planedo TERO, kiu ne moviĝas. La Teron ĉirkaŭiras aliaj planedoj. Ankaŭ Suno. Tion certigis ankaŭ la sankta libro – Biblio, de kiam homoj fariĝis alfabet-kapablaj, sciiis legi kaj skribi.*

Poste „falis bombo“! Ne el ĉielo (kvankam la hezitantoj tion meritus), sed en la formo de nova kosmo-teorio, kiun proklamis (ne tuj tre kuraĝe) la pola kanoniko Nikolauo KOPERNIKO (1475–1543**): la kerno de la kosmo ne estas nia planedo, sed SUNO!!** Tion la Mondo ne povis akcepti! Precipe ne religiaj cirkloj, kiuj la teorion eĉ malpermesis (kiel kontraŭ-biblian). (La plej „ortodoksaj“ kontraŭstarantoj estis jezuitoj; ankaŭ en Prago).

Kaj kion Tycho Brahe? Jes, la teorio surprize trafis ankaŭ lian koron. Kvankam li tre estimis Koperniko-n, li ne povis plene kongruiĝi kun li, malgraŭ, ke li tre honeste la aferon pricerbumis, strebante kompreni. Poste li restis je sia mem-elpensita konstruo, je sia „pli taŭga“ kosmo-sistemo. Sed la astronomio favore antaŭeniris nerigardante hezitulojn, sed avide akceptante progresemulojn.



**Johannes Kepler**



Kia estis Johannes Kepler. Li tre „avide“ kaptis la proponon de T. B. labori komune en Prago. Havi la nemezureblajn observaĵojn de Tycho (li pensis pri eldono de 24 volumoj, kiam Tycho mortis!). La observaĵojn li opiniis „sia plej rara valoraĵo“, sur kies bazo li mem povas progresi. Li komencis tie, kie Brahe sian laboron finis.

- Brahe proklamadis, ke planedoj *ne moviĝas* **sur kompaktaj sferoj…**

Kepler pruvis , ke planedoj *moviĝas* en

- **aeraj sferoj…**
- Brahe, kiu okupiĝis pri la planedo Marso (al ni la plej proksima) malkovris, ke ĝia orbito-movo **ne estas cirkla…**

Kepler malkovris, ke ĝi estas nek cirkla nek ovala, **sed elipsoforma**…
Ankaŭ Kepler kontinuis sian laboron ĉe la Marso, ĉar lia genia intuicio diris al li: se la fenomenoj ekzistas ĉe tiu planedo – do kial ne ĉe ĉiuj planedoj?! *„Mi multe okupiĝis per esplorado de fizikaj kialoj. Mi volas montri, ke la ĉiela mekaniko ne estas simila al la viva kreaĵo. Sed similas al la horloĝa mekanikaĵo. Tiel ja preskaŭ ĉiuj diversaj movoj estas kaŭzitaj de la universala magneta forto – tute simpla – kaj tiamaniere kiel la horloĝa mekaniko moviĝas per pezilo.*
*(Rim. Ĝis tiam oni kredis, ke steloj troviĝas sur kompaktaj sferoj. M.T.),*
*Mi nur demonstras, kiel planedoj moviĝas en senkompaktaj sferoj.* ***Kaj ke la „pezilo“ de nia planedo Tero – estas la SUNO. La orbito estas elipsa.“***

**Elipso - kia „magia“ vorto…**
En Prago ni jenan (elipsoidan) formon renkontas „je ĉiu paŝo“ Kiel jam estis dirite, ĝi estis la favorata arkitektura formo de tia epoko.
Elkreskas jena demando: kie en tiu baroka „torento“ vivis niaj du protagonistoj? Kie ni ilin povus renkonti (niaimage)?
Jen: se ni eliras el la grandioza burga arealo Hradčany direkten al Pohořelec (tram-vojo), ni staras „vizaĝ-al-vizaĝe“ al la monumenta skulptaĵo de du kunstarantaj figuroj: tio estas Tycho Brahe kaj Johannes Kepler. Ĝi staras sur parcelo de la nuna *Gimnazio de Johannes Kepler*. En la tempoj, pri kiu parolas nia eseo, staris ĉi tie larĝvasta domo de la rudolfena kortegano Curcius (Curcio, Kurcius).

Ni klarigu, ke tiu gravulo, estinte ambasadoro en eksterlando, renkontiĝis tie kun la famo de Tycho Brahe, kaj instigis Rudolfo-n por inviti la astronomon veni en Pragon.
Kiam li en la eksterlando postnelonge mortis, la Imperiestro aĉetis la domon de la vidvino (je 10 000 guldenoj), por ke tie loĝu T.B. kun sia familio (li havis 5 infanojn). Brahe tre plendis, ke lian noktan observadon ĝenas vesperaj ceremonioj (kaj sonoriloj) de monaĥoj el apuda kapucena monaĥejo. La Imperiestro proponis al Brahe elekti el tri kasteloj, kiuj troviĝas proksime de Prago. Brahe elektis la kastelon en Benátky nad Jizerou (tiam Nové Benátky). Tie povis vivi Brahe kun la familio kaj kun siaj kunlaborantoj, kiuj alvenadis popaŝe de diversaj landoj. Inter ili ankaŭ J. Kepler. Plej grave, ke tie estis 13 ĉambroj kaj en kelkaj troviĝis astronomia aparato. Tiuj estis tre valoraj propraĵoj de B. Ili estis grandaj objektoj, kiujn oni transportis per river-ŝipoj kaj poste per vehikloj, kiuj estis tiritaj de virbovoj.
Kiel la observejo meritas esti nomita ankaŭ la paviliono Belveder situanta en la Reĝa ĝardeno (Hradĉany), famega pro sia italdevena renesanca ĉarmeco. Ja tie ili havis pli bonan – kaj certe pli belan! – rigardon ol en Benátky-kastelo.
Do, ankaŭ Johannes Kepler jam estis „sur la loko“… Bedaŭrinde, la kunlaboro de la du eminentuloj ne daŭris longe (eble 1,5 j.) pro morto de T. B.
Estu substrekite, kaj ni devas multe honorigi Kepleron, kiu restis en nia lando 12 jarojn , tial ni lin opiniu „nia kuncivitano“.
Krom Prago meritas la mencion ankaŭ aliaj urboj, kiuj estas al li koncernaj: *Weil der Stadt (en kiu li 27.12.1571 naskiĝis), Tubingen, Leonberg, Graz (ĉeĥe Štýrský Hradec), Linz, Ulm, Regensburg (ĉeĥe Řezno) – kie li mortis 15.11. 1630 (kaj estis entombigita, sed lia nekatolika tombo jam ne ekzistas!). Lia neforgesebla personeco estas memorigita en tiulokaj muzeoj.*
Per humura tono ni rimarkigu, ke la figuroj en la filmoj „La bakista imperiestro“ (Pekařův císař), kaj „La imperiestra bakisto“ (Císařův pekař) estis reale vivantaj personoj sur la imperiestra korto. Ja, estis inter ili menciitaj „pseŭdo-sciencistoj“, sed ankaŭ dignaj personoj:
**Tadeáš Hájek z Hájku, Jan Jessenius, Kryštof Harant, Václav Budovec, Martin Bacháček.** Ni ilin menciis jam koncerne de Tycho Brahe, sed oni povas imagi, kion ilia amikeco signifis por Kepler en la jaroj de amara fato, kiujn li travivis en nia lando: en la tagoj de plago mortis kaj lia unua edzino kaj fileto (la restantajn li forveturigis al Kunštát u Hodonína). Baldaŭ li denove edziĝis, sed la malfeliĉo alvenis el alia flanko: en Wittenberg estis lia patrino kulpigita sorĉistino, kiu onidire kaŭzas malbonaĵojn kaj malsanojn al siaj najbaroj. La bedaŭrinda virino,

kiu ja la tutan vivon okupiĝis pri naturkreskantaj herboj por helpi kontraŭ malsanoj, travivis preskaŭ 4 jarojn en prizonejo. Ĉiujn jarojn strebis la ŝatata filo Johannes pri ŝia senkulpigo kaj liberigo. El la prizono eliris rompita maljunulino, kiu baldaŭ mortis.
Nun ni alsternu la tristan, teruran epokon en nia lando post la rebelia elstaro de nekatolika nobelaro kaj ties malvenko en la batalo sur la Blanka monto, 1620 (Bílá hora) apud Prago. Multaj ekzekutitoj estis la menciitaj amikoj de Kepler. Li vivis en senĉesa angoro kaj timo. Sed ne okazis io malbona. Male – oni povas diri, ke li havis sukcesajn jarojn. De lia alveno al Prago (1601) pasis jam 20 jaroj. Pasis du imperiestroj. Restis la taskoj…

**Taskoj kaj rezultoj de Kepler:**
Ni rememorigu, kial estis Brahe kaj Kepler de Rudolfo la Dua al Prago invititaj: por ke ili al la Imperiestro ellaboru astronomian tabelaron – kaj precipe Lian personan horoskopon. La duan taskon ili plenumis (kaj multofte kun Li traktis). La unuan (ankoraŭ) ne.
Kepler diris, ke „*kiel la kuracisto devas iri al malsanulo, devas ankaŭ en astronomio iri ĉio flanken, se la naturo neatendite proponas la ĝis nun ne plene esploritan fenomenon.* Tial Kepler forŝovis la tabelaron kaj anstataŭ ĝi li ellaboris sian unuan verkon „Astronomia nova“ kiun li dediĉis al la Imperiestro kiel kristnasko-donacon, en la jaro 1605. En la oficiala posteno de imperiestra matematikisto Kepler progresis, kaj famiĝis ne nur kiel astronomo. Eĉ estis al li proponite esti profesoro
en la praga universitato, sed li tion rifuzis (pro sia nekatolika konfeso).
Ĉi tie ni ne povas ne mencii la tragikan okazon de la aŭtodafeo de Giordano Bruno (1609). „De la sinjoro Wacker el Wackerfeld (la imperiestra ambasadoro en Italujo) mi eksciis, kiel estis Bruno en Romo mortbruligita. Oni diras, ke sian faton li eltenis neŝancele. Ĉiujn religiojn li proklamis vanaj. Dion li „pistis“ je cirkloj kaj punktoj“. (Respekteme esprimiĝis Kepler – kontraŭe de Bruno-malamikoj:
„Nun Bruno transformita je fumo povas serĉadi kaj vizitadi siajn senfinajn mondojn“).
En la jaro 1625 Kepler finfine kompletigis la „Astronomian tabelaron“, kiun li al honoro de sia kliento nomis „Tabulae Rudolphinae“, kaj fordonis ĝin en la manojn de la Imperiestro Ferdinando la Dua, (kaj ricevis la honorarion 4 000 guldenojn). Ĉe la korto de tia reĝo la funkcio de matematikisto jam ne estis bezona, do Kepler devis serĉi alian okupon por vivteni la familion. Lin okupis (avide lin akceptis) alia grandulo: **Alberto de Valenŝtajn.** Same, kiel Rudolfo, ankaŭ tiu ĉi suvereno bezonis scii sian vivo-sorton (supozeblis pozitivan!). Kepler neniel malgravigis horoskopojn: „Kie troviĝus la honesta patrino astronomio, se ne estus ŝia diíboĉema filino astrologio“. En lia hereda postrestaĵo troviĝis 800

horoskopoj! Inter ili kelkaj, ne nur unu, por Alberto V. Laŭdire li malkovris la tragedian faton de la grandsinjoro, sed ne sciigis ĝin al tiu. Tial li ellaboris kelkajn horoskopojn „apudajn“ kiujn li sternis antaŭ Valenŝtajn.
Kvankam Pragon famigis precipe la personoj alilandaj, el nia lando tamen devenas kelkaj eminentuloj, kiujn ni rememoru:

**Tadeáš Hájek z Hájku**
Estis sendube la plej elstara ulo dotita per multaj talentoj: oficiale li estis persona kurcisto de la Imperiestro Rudolfo, do medicin-doktoro. Krom tio li interesiĝis pri matematiko, astronomio (astrologio), alkemio, botaniko... Li „estis hejme“ en la sferoj kulturaj ne nur nialandaj, sed eŭropaj. Tial li estis taŭga ambasadoro de Rudolfo ankaŭ rilate la art-aferojn, li instigis Lin por aĉeti artaĵojn, kiujn Li volis havi en sia sidejo.
Li estis konato de multaj edukitaj kolegoj en Eŭropo. Kaj li estis tiu, kiu instigis la Imperiestron alvoki la astronomon Tycho Brahe en Pragon. La domo de la familio Hájek estis kruc-punkto de korespondado inter eŭropaj eminentuloj. Ni nomu kelkajn personojn, kiujn ni konas el la menciitaj filmoj: John Dee, Edward Kelly – la alkemisto, k.a. Ili en siaj landoj estis estimataj kiel eminentuloj en sciencoj.

**Jan Jessenius**



Estimata rektoro de la universitato en Wittenberg, en la praga universitato li kiel la unua demonstris hom-sekcion. Li estis unu el la 27 homoj, kiuj post la subpremo de rebelio (1621) estis ekzekutitaj. Inter tiaj homoj vivis en Prago **Johannes Kepler.** Se oni deĉifras lian horoskopon (kiun li por si mem faris, 1597 j.), oni ekscias, ke lia vivo estos granda dramo de la homo, al kiu la fato donacos nenion senpene, kiu devos multon oferi, multon perdi – sed ankaŭ multon gajni. Kaj multon riski… Ju pli peza estis lia vivo-ŝarĝo, des pli senhezite li strebis tion solvi. Nek por momento li deprenis la ŝarĝon plej gravan, kiun li al si taskis: la observadon - esploradon de la universo kaj senĉesan serĉadon de ĝia konstanta ordo-sistemo. Kaj per sia matematik-astronom-intuicio li tion sukcesis. Feliĉe, ke li estis mem-konscia, ne timema homo; li pri sia vero ne dubis. Ni ne opiniu arogo kaj blasfemo, sed metaforo jenan eldiron: *„Dio mem devis atendi ses miljarojn, ĝis Lia verko estis komprenita.*“

Je la fino (por „amatoraj astronomiaj legantoj“) ni tie havas la sumigojn, kiun ni en nia epoko opinias „banalaĵo“??, kiun konas ĉiu infano (ĉu vere?) Kaj kiu estas „klara kiel survangofrapo“…

**La KOPERNIK-a heredaĵo -**
kiun neplene akceptis Tycho Brahe; kaj kompletigis Johannes Kepler.
**Pri la cirkulado de ĉielaj sferoj – Nikolauo Kopernik**

**- 1. La centro de ĉiuj ĉielaj astroj ne ekzistas**
**- 2. La centro de la Tero ne estas la „centro de la Mondo“, sed nur centro de la Luno-orbito**
**- 3. Ĉiuj planedoj moviĝas ĉirkaŭ la Suno, kiu estas la centro de iliaj orbitoj, kaj tial ankaŭ la centro de la Mondo**
**- 4. La distanco Tero – Suno estas tre malgranda kompare kun la distanco(j) inter sferoj de steloj**
**- 5. La movo de la ĉielo, kiun ni observas, estas nur ŝajna; en ĝi reflektiĝas nur la movo de la Tero ĉirkaŭ la Suno**
**- 6. La movo de la Suno inter la steloj estas same ŝajna kaj ekestas pro la movo de la Tero ĉirkaŭ la Suno.**
**- 7. Similaj movoj de ĉiuj planedoj sur la ĉielo estas kaŭzitaj pere de kunigo de iliaj propraj movoj (ĉirkaŭ la Suno) kaj de la Tero-movo**

**Aldono**
Ni aldonu, ke Tycho Brahe venis en la landon, en kiu en pasinto la astronomio havis sian seriozan staton. La pragaj reĝaj kortoj, komence de Přemysl la Dua, ebligis ĝian disvolviĝon; ofte per la rekta subteno de la regantoj, kiuj ja favorigis la astrologion (sciante, ke iaj stronomiaj mezuroj estas tamen bezonaj). La astronomiajn elementojn ni povas trovi ekzemple sur la Karlo-ponto, same en Staroměstská-turo, ĉar ĝuste Karlo la Kvara estis tiu reĝo, kiu pri la astronomio interesiĝis. Eĉ pli interesa estas la fakto, ke sur la reĝkortoj estis amasigitaj kopioj de la gravaj tiefakaj manuskriptoj, kiuj troviĝis en Eŭropo. Ili estas deponitaj en niaj ŝtataj, religiaj, akademiaj muzeoj, apud la raraj observo-aparatoj, kiujn tuŝis la manoj de la nomitaj (ankaŭ nenomitaj) eminentuloj. Ni sentu dankon!

# Jubileo de Josef Václav Sládek



Ĉi-jare pasos 180 jarojn ekde la naskiĝo de **Josef Václav Sládek** (1845–1912), elstara ĉeĥa poeto, tradukisto, ĵurnalisto kaj fondinto de ĉeĥa poezio por infanoj.
Kiel reprezentanto de realismo kaj patriota verkisto, li en sia verkaro celebris la ĉeĥan kamparon, hejmon kaj infanaĝon, kio speguliĝas en liaj melodiaj kaj ritmaj versoj, ofte muzikigitaj. Signife influis lin restado en Usono (1868–1870), dank' al kio li fokusis sur tradukoj de angla-usona literaturo, inkluzive de 33 dramoj de Shakespeare. Li agis kiel redaktoro de Národní listy kaj Lumír, estis membro de la Ĉeĥa Akademio, kaj lia verkaro, kiel la kolekto *Zlatý máj* aŭ la poemo *Lesní studánka*, restas populara ĝis hodiaŭ.
Honore al la jubileulo ni inkluzivas en ĉi tiu numero du liajn poemojn esperantigitaj de Josef Fousek.

## El la manoj de l' sorto

El manoj de l' sort' mia vivopren'
similas al teren ĵetita gren'.

Elkreskas en spikon malgranda grener'.
kaj spiko kliniĝas post tempo al ter'.

Ĝerminte spik' kreskas. De l' homa la kast'
simile sur tero mi estas nur gast'.

De l' reĝo kaj sklavo jen homa vivsort'.
Por mi viv' - konsol', ne timigas min mort'.

La spiko kliniĝas al tero-patrin',
min dia ĝarden' rekreskigos je l' fin'.

(1889)

## Printempo venos

Printempo venos ree ĉeĥan landon
rideme, klare, kun naskiga forto,
kaj super tomboj, kie paŝis morto,
ornamos floroj verdan festgirlandon.

Plugiloj ĉeĥaj teron reekplugos,
el brunaj kampoj ŝvite trempigitaj
ni mem rikoltos, mem liberigitaj
dankeme preĝos, dank' ĉielen flugos.

Printempo venos kaj hirundaj pepoj
la pacon profeteme aŭgurontaj.
Vespere av' rakontos al genepoj, -

dum ili ludos per la grizaj haroj -
de l' ĉeha lando pri malĝojcentjaroj
estintaj -- sed neniam revenontaj.

(1889)



# Ĉu estas land’

Leono Zamenhof

Ĉu estas land’,
Kie eternas suno,
Kie ĉiel’
Ne ploras en aŭtuno?
Kie la ter’
En ama sentebrio
Per flora brust’
Ridas al sunradio?

Ĉu estas land’,
Kie la ĝoj’ ne ĉesas,
Senzorga kant’
Dorlotas kaj karesas,
Kie kontent’
Kaj forta vivadoro,
Ne senesper’
En ĉies regas koro?

Ĉu estas land’,
Kie de vivmateno
Ne nutrus nin
De la mensog’ veneno?
Kie preĝej’
Glorante amon Dian,
Imitus mem
Ekzemplon grandan Lian?

Ĉu estas land’,
Kie la amo tronas,
Kie la kor’
Perfidi vin ne konas?
Kaj kie larm’
Ne estas larm’ de ploro
Sed de feliĉ’
De amoplena koro?

Ĉu estas land’,
Kie animo laca
Trovus en ĝi
Ripozon vere pacan?
Kaj kie bru’
Kaj krioj de batalo
Ne igus nin
Memori pri realo?

Ĉu estas land’,
La lando ideala,
Kie la hom’
Estas al hom’ egala?
Kie fratec’
Ne estas vort’ de vano,
Sed ideal’
Plej sankta de regnano?

Ne serĉu ĝin
Ĉi landon sur la tero:
Ĝi trovas sin
En kred’ nur kaj espero.
En tiu land’ —
En land’ de propra sento
Troviĝas nur
Korpaco kaj kontento!




La poemon *Ĉu estas land'* el la pasinta paĝo muzikigis Pavla Dvořáková. Vi povas aŭskulti la kanton en ŝia interpreto en la jutuba kanalo Esperanto-Klubo La Ponto: https://www.youtube.com/watch?v=maEfr9dsYFc.

---

**Termíny schůzek od září 2025:**

11. 9. / 25. 9. // 9. 10. / 23. 10. // 6. 11. / 20. 11. // 4. 12. / 18. 12.

**Klub esperantistů v Praze,**
pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

| | |
|---|---|
| Sídlo: | Jirečkova 5, Praha 7 – Holešovice, PSČ 170 00 |
| Web: | http://bulteno.cs-retromusic.net |
| E-mail: | praha@esperanto.cz |
| Facebook: | https://www.facebook.com/esperantoprago |
| YouTube: | Esperanto Prago |
| Schůzky: | Revoluční 5, Praha 1 – Nové Město, PSČ 110 00 |